

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 6, nummer 2 (32) juli-augustus 2013

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 6, n-ro 2 (32): julio-aŭgusto 2013
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe
<http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html>
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

*Finfine, post longa vintro, malseka printem-
po kaj longa foresto de la suno, alvenis somero
en nian landon ! Nur rigardi la naturon kun
ĝiaj arboj, arbustoj kaj siaj multaj floroj en
ĉiuj koloroj ripozigas kaj gajigas la korojn
de la homoj.*

*Ankaŭ la ferioj estas antaŭ la pordo kun
multa libera tempo por promeni, naĝi kaj
bicikli, sed ankaŭ, mi esperas por legi nian
revuon La Ponto. Albert Claesen, la mastro de
la Esperanto-Forumo sciigis al mi, ĝis la 2-an
de majo jam 1562 personoj vizitis la Esperan-
to-forumon (vidu ĉi-supre) por legi la revuon.*

*Ankaŭ ĉi-foje La Ponto prezentas interesajn
tekstojn: la 5-an parton de la historio de Espe-
ranto, traktante i.a. la skismon en la UEA en
1936 en Ĝenevo, kiun jam delonge estis mal-
farita ; urĝa alvoko subteni akcion por savi la
abelojn kiuj estas malaperantaj ; priskribo de
parto de Bruselo, vidata tra la okulo de pro-
menanto, artikolo kiu certe interesos la ne-
Belgajn Eŭropanojn, kiuj deziras iomete
konatiĝi kun la ĉefurbo de la EU .*

Sunajn feriojn kaj agrablan legadon !

Pieter Jan Doumen.

Plua historio de Esperanto (5)

(Verdere geschiedenis van het Esperanto) (5)

Intertempe la bezono al internacia esperan-
tista organizaĵo estis forte sentata, kaj jam en
1908 laŭ iniciato de Hector Hodler en Ĝenevo
estis fondita la Universala Esperanto-Asocio
(U.E.A.). Ĝi konsistis nur el individuaj mem-
broj en ĉiuj landoj. En ĉiuj pli gravaj lokoj
U.E.A. havis delegitojn, t.e. speco de konsuloj,
kiuj donis informojn kaj helpon al membroj
kiuj deziris tion. En ĉiu lando estis ankaŭ ĉef-
delegito, kiu prizorgis la administradon kaj
reprezentis la estraron de U.E.A., kiu eldonis la


ĉiumonatan gazeton « Esperanto » kaj ĉiujare
jarlibron kun la adresoj de ĉiuj delegitoj. Ĉiu-
jare U.E.A. havis sian kongreson, la unuan
fojon en 1910 en Augsburg, poste ĉiam dum
la Universalaj Kongresoj.

Sed ĉiam pli multaj esperantistoj deziris
internacian federacion de la landaj asocioj,
same kiel ĉi tiuj estas federacioj de la lokaj
klubo. Kaj en 1903 oni fondis la Internacian
Unuiĝon de Esperantistaj Societoj (I.U.E.S.),
sed pro la militesplodo en 1914 tiu unuiĝo
neniam aktive ekfunkciis. Dum ĉi tiu tempo
voĉdonrajton dum la kongresoj havis la
« Rajtigitaj Delegitoj », t.e. la reprezentantoj
de la landaj asocioj, kiuj pagis certan kotizon.



La gesinjoroj Zamenhof en Dreseno (1908)

Dum la unua mondmilito U.E.A. estis la sola
internacia organizaĵo kiu daŭre funkciis, kaj
ĝia centro en la neŭtrala Svisujo faris multan
efikan helpon al militkaptitoj kaj aliaj viktimoj,
liverante leterojn k.t.p. Post la milito plifortiĝis
la deziro pri federacio de la landaj asocioj, sed
persona ĵaluzo inter la estraranoj de U.E.A. kaj
la Centra Oficiejo estis grava malhelpo. Fine,
dum la 14-a kongreso en Helsinko en 1922, oni
venis al kompromisa solvo, la t.n. « Kontrakto
de Helsinko » : U.E.A., konsistanta el indivi-
duaj membroj, estis akceptita inter la Oficialaj
Institucioj ; la landaj organizaĵoj, anstataŭ la
ĝisnunaj Rajtigitaj Delegitoj, elektis reprezen-
tanton, kiuj formis la Konstantan Reprezen-
tantaron de la Naciaj Societoj (K.R.), kiu pri-
zorgis la kunlaboron inter la landaj asocioj.



K.R. kaj U.E.A. elektis kune la Internacian Centran Komitaton (I.C.K.), kiu estis la plej supera gvida organo de la Esperanto-movado. La oficejo de I.C.K. estis en Ĝenevo, kaj ĝia estro estis Robert Kreuz, unue kiel Ĝenerala Sekretario, poste kun la titolo 'Direktoro'.

Dum la kongresoj okazis komunaj kunvenoj de I.C.K., K.R. kaj la komitato (estraro) de U.E.A. Tiuj kunvenoj faris ĉiujn gravajn decidojn, kiujn antaŭe faris la ĝeneralaj kongreskunsidoj.

La tasko de I.C.K. estis la ĝenerala gvidado de la movado. Ĝi organizis la kongresojn, eldonis la oficialajn dokumentojn, k.t.p. U.E.A. kaj K.R. donis al ĝi subvenciojn. Ĝia prezidanto estis unue d-ro Edmond Privat de Ĝenevo, kaj poste John Merchant de Sheffield, Britujo. Tamen multaj ne estis kontentaj pri ĉi tiu kompromisa solvo de la organiza demando. Oni deziris unu internacian federacion, konsistantan el la landaj asocioj kaj individuaj membroj. Al la gvidantoj de U.E.A. oni riproĉis, ke ili ne volas tian aranĝon kaj ke ili foruzis ne nur la rentumojn, sed ankaŭ la kapitalon, donacitan al U.E.A. far Hodler.

En 1928 la Franca ĉefdelegito de U.E.A., s-ro Delanoue, publikigis tiajn kritikojn, sed en formo de akra atako kaj akuzo kontraŭ la membroj de la estraro, precipe kontraŭ la meritplena d-ro Privat, kiu ja faris netakseble grandan kaj valoran laboron por la Esperanto-movado. Speciale elektita komisiono detale esploris en Ĝenevo la tutan organizaĵon U.E.A. kaj malpravigis la suspektojn kontraŭ ĝiaj estraranoj. Dum la Antverpena kongreso en 1928 d-ro Privat per brila parolado defendis sin kontraŭ Delanoue, kaj akiris la simpatian de la kongreso, kiu plene rehonorigis la estraranojn de U.E.A. Delanoue, kiu ne estis bona diplo-

mato kaj estis uzinta tro krudajn rimedojn, eĉ estis eksigita kiel ĉefdelegito por Francujo. Ankaŭ la tempo ankoraŭ ne estis matura por fari ŝanĝojn en la organiza sistemo.

Sed dum la Pariza kongreso en 1932 la K.R. nuligis la Kontrakton de Helsinki, kaj oni elektis komisionon por ellabori novan statuton de internacia organizaĵo. U.E.A. rifuzis partopreni en tiu komisiono, sed deklaris sin preta konsideri ĝiajn proponojn. Fine oni do starigis novan organizaĵon: la Universala Federacio Esperantista (U.F.E.), al kiu aliĝis ĉiuj pli gravaj landaj asocioj.

En majo 1933 oni fine sukcesis aranĝi en Ĝenevo komunan kunvenon inter la reprezentantoj de U.F.E. kaj U.E.A., kaj kun bona volo de ambaŭ flankoj oni venis al la « Plano de Ĝenevo », kiu almenaŭ promesis pli bonan solvon de la problemo. Kaj dum la kongreso en Kolonjo en 1933 la klopodoj kondukis al la t.n. « Interkonsento de Kolonjo ». Laŭ ĝi oni forlasis la idon U.F.E., kaj U.E.A. estis aliformita al federacio de landaj asocioj. Ekde tiam U.E.A. estas la tutmonda organizaĵo de la Esperanto-movado, al kiu la landaj asocio aliĝis per kotizo de duona Svisa franko por ĉiu el siaj membroj. Tiuj kiuj deziris, povis pagi pli altan kotizon kaj fariĝi « aktivaj membroj », ricevantaj la jarlibron aŭ la jarlibron kaj la gazeton *Esperanto*. La gvidadon de U.E.A. prizorgis la Internacia Komitato, elektita de la landaj asocioj kaj de la delegitoj, kaj tiu komitato elektis la Centran Estraron.

Dum la kongreso en Stokholmo en 1934 okazis elektoj por la Internacia Komitato de U.E.A. Ĉar kelkaj el la malnovaj funkciuloj de U.E.A. ne estis reelektitaj, prezidanto Stettler, vicprezidanto Karsch kaj unu el la direktoroj, Hans Jakob, ofendiĝis, demetis siajn oficojn kaj forlasis la salonon. Tio kompreneble vekis grandan tumulton en la kongreso, sed baldaŭ la animoj retranskiviligis. Kiel nova prezidanto estis elektita en Parizo Louis Bastien. Kreuz, kiu post la likvido de I.C.K. estis direktoro de U.E.A., kune kun Jakob, restis en sia posteno.

La nova estraro havis en la komenco grandajn malfacilaĵojn pro la malplena kaso kaj devis enkonduki gravajn ŝparojn. En 1936 Kreuz subite mortis. Nova direktoro fariĝis Cecil C. Goldsmith de Londono. Tiam la estraro decidis transporti la sidejon de U.E.A. al Rickmansworth apud Londono, kie oni ricevis donace tutan domon. Grupo de svisaj anoj de U.E.A., kiuj deziris, ke la sidejo de U.E.A. restu en Ĝenevo, komencis ĉe la svisa tribu-



nalo proceson kontraŭ la estraro por malhelpi la translokigon, bazante sin sur formala erareto en la decido. Dum la kongreso en Vieno en 1936 oni ne sukcesis veni al interkonsento. Tial la prezidanto de U.E.A. proponis al la landaj asocioj, delegitoj kaj individuaj membroj forlasi la asocion kaj fondi novan organizaĵon en Londono sub la nomo *Internacia Esperanto-Ligo* (I.E.L.). La landaj asocioj kaj la plej multaj delegitoj kaj aktivaj membroj sekvis la proponon. La estraro retiris sin el la Svisa proceso kaj lasis la oficejon en Ĝenevo al la protestintoj. Tiuj ĉi nun komencis personan persekuton kaj proceson kontraŭ Bastien, sed atingis nur, ke la tuta esperantistaro unuanime kondamnis ilian agadon.

(*Laŭ Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)

Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Italio – *Itala tribunalo malaprobas angligon* –

La Lombardia regiona administra tribunalo (RAT) akceptis la apelacion prezentitan de multaj profesoroj de la Milana Politekniko, kuraĝe opoziciante al la truda kaj ekskluziva angligo de la tuta studa programaro de tiu Milana universitato. La tribunalo de Milano taksis tiun ĉi decidon neakordigebla kun la leĝo n-ro 1592/1933, kiu fiksas la uzadon de la Itala lingvo en ĉiuj universitatoj. Temas pri malvenko de rektoro Azzone kaj la fakultat-estra konsilio, kiu malfermis la vojon al pluaj juraj iniciatoj koncerne la lingvan diskriminacion en la Itala universitato.

La Asocio Nitobe por Lingvaj Justeco kaj Demokratio favore bonvenigas tiun RAT-verdikton. Nun necesas daŭrigi la agadon por restarigi lingvan justecon en Italio, ĉetribunale

kontesti la lingvan politikon de la Torina Politekniko, kiu pagigas la studentojn dezirantajn studi itallingve pli ol tiujn kiuj studas angla-lingve; kaj la lingvan politikon de la Venecia Ca' Foscari, kiu intencas malebligi la enmatrikuligon de studentoj kiuj ne atingis la angla-lingvan nivelon B2.

La Itala Esperantista Junularo esprimis sian plenan kontentecon pri la historia verdikto de la Milana tribunalo, kiu nuligis la decidon de la estraro de la Milana Politekniko, laŭ kiu ekde la sekva universitata jaro ĉiuj magistrigaj kaj doktorigaj kursoj estos Anglalingvaj.

(*Ret-Info, Hungario*)

Hodiaŭ Eŭropo parolus

- France se realiĝus la revo de Napoleono,
- Germane se Hitler estus venkinta,
- Ruse, se Stalin estus sukcesinta.

Feliĉe ili ne venkis.

Do nun ni povas libere paroli – en la Angla...

Francio – *Internacia peticio favore al E-o* –

De post la komenco de februaro 2013 iu peticio lanĉita sur la interreton ricevas subskribojn el la tuta mondo. Homoj el pli ol 104 landoj hodiaŭ aprobis tiun alvokon lanĉita de Ĵoaneso de Divonne, la aŭtoro de tiu peticio: « *Esperanto, oficiala lingvo de la Eŭropa Unio, nun!* » Ĝi troviĝas je tiu ĉi retadreso: http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_lingue_oficielle_de_IUE/ kaj estas rekte alirebla en naŭ aliaj lingvoj (Angla, Araba, Korea, Germana, Franca, Hispana, Japana, Portugala kaj Rusa). Evidente, la teksto de la peticio ankaŭ alireblas nun en Esperanto kaj 14 aliaj lingvoj. La parolantoj de la 24 lingvoj povas subskribi nur sur la rekte alireblaj paĝoj, kaj nur en sia lingvo. Tiu peticio ankaŭ alireblas ĉe Fejsbuko. <http://www.Facebook.com/EsperantooficialalingvodeEuropaUnuoNun>.

Notindas, ke Ĵoaneso estas 16-jara junulo de Kostariko, kie li faras siajn gimnazian studon. Li lanĉis tiun ideon kiel defion al la tuta mondo por generi, danke al provokiva titolo la apelon de planedskala civitaneca pripensado. Ĉiuj homoj bezonas internacian lingvon por povi interkomuniki. Tiu internacia lingvo ekzistas kaj disponeblas ekde 1887. Esperanto taŭgas por tiu rolo, ĉar ĝi posedas la necesajn kvalitojn por ludi tiun rolon. La Angla ne rajtas esti elektita kaj evidente ne povas esti trudita, ĉar tiu lingvo neniel posedas la necesajn kriteriojn



de facileco kaj neŭtraleco, kiuj estsas necesaj por justa internacia komunikado.

(*Thierry Saladin*)

Belgio – *Domo de Eŭropa Historio en Ekzilo* – Informcele ĉi tie mia mesaĝo al Sro Thomas Bellinck, la kreinto de nuna ekspozicio en Bruselo, kie Esperanto rolas kiel ĉefa lingvo, kaj kies rolon klare menciis la iama Belga ĉefministro Verhofstadt televide fine de majo.

La interesa temo de la ekspozicio estas en la fora estonteco la fiasko de EU en la jaro 2018, “La Historio de la iama EU”, - la lasta kaj 33-a lando kiu aliĝis al EU estis la sendependa Skotlando en 2017 (intertempe aliĝis krom Kroatio en 2013, ankaŭ Serbio, Makedonio, Montenegro kaj Islando). Kvankam ne estas klarigo de tio en la ekspozicio, la aŭtoro klare volas montri la rolon de la manko de komuna lingvo, de komuna Eŭropa identeco, en la fiasko de EU. Li ankoraŭ esperas, ke ni povos eviti tiun fiaskon !

Kara Thomas, vi klare identigis la Aĥilan tendenon de la tuta Eŭropa projekto, ĝian malsukceson disvolvi, kune kun ĝia ekonomika kaj politika integriĝo, kulturan kaj lingvan unuecon, kondukantan al emocia ligo inter la civitanoj kaj Eŭropo kaj al la disvolvo de Eŭropa identeco, kaj sekve al la fremdiĝo de multaj civitanoj en ĉiuj ŝtatoj-membroj.

*Laŭ D-ro Sean Ó Riain,
prezidanto de EEU*

Hungario – *Civito vendas Heroldon* –

La Esperanta asocio Civito ne plu kapablas eldoni *Heroldon de Esperanto*, sed esperas povi vendi la gloran nomon al nova eldonisto.

Tion montras freŝa komuniko, aperinta en la retejo de la Civito.

Heroldo de Esperanto, unu el la plej malnovaj kaj iam unu el la plej prestiĝaj gazetoj en Esperanto, ĉesis aperi pasintjare. Jam en la jarkolekto 2011 mankis kvin numeroj. El la promesitaj 17 numeroj de 2012 aperis nur kvin.

Heroldo de Esperanto estis fondita en 1936 de la Internacia Esperanto-Ligo (IEL), kiu separiĝis de UEA kaj havis sian sidejon en Rickmansworth apud Londono. La gazeto havas gloron pasintecon.

Jam de longe evidentis, ke la Civito spertis enormajn problemojn, provante pleniĝi la paĝojn per antaŭaj artikoloj. La malfruo en la aperoritmo jam daŭris pli ol unu jaron, ĉar mankas entute 23 numerojn kaj devus aperi ĉiujare 17 numeroj. Multaj abonantoj esprimis sian malkontentecon aŭ simple ne plu reabonis.

La 10-an de junio 2012 tamen aperis en la retejo de la Civito « respondo al lastatempe ricevita demando », laŭ kiu « nenio malhelpas la eventualan vendon » de *Heroldo de Esperanto*. Laŭ la sama anonco la Civito pretas vendi ankaŭ la nomojn de siaj aliaj aperantaj periodaĵoj.

La tuta artikolo pri la afero estas legebla ĉe : <http://www.liberafolio.org/2013/civito-vendas-mortintan-heroldon> . (*Ret-Info, Hungario*)

Helpu savi la abelojn !

(*Help de bijen redder!*)


Giganta trompo estas organizata en Bruselo koste de la abeloj, de la biodiverseco... kaj de ĉiuj civitanoj kiuj dum multaj jaroj luktas pro la malpermeso de la pesticidoj mortigantaj la abelojn en Eŭropo kaj en la tuta mondo!

Se formortos la abeloj, polenado de fruktoj kaj grenoj ne plu eblos grandskale, kaj mondovasta malsatego estos neevitebla !

Ni devas tuj haltigi tiun planon, antaŭ ol ĝi havos dramecajn sekvojn por niaj kulturitaj vegetaĵoj kaj nia estonta nutraĵo. Mi demandas vin urĝe subteni la Eŭropan peticion por savi la abelojn kaj transsendi tiun ĉi artikolon al viaj amikoj kaj konatuloj, tiom kiom vi povos. Ni ne povas perdi tempon.

Post jaroj de obstina lukto de la abelkulturistoj kaj aliaj civitanoj la Eŭropa Komisiono oficiale decidis malpermesi tri neonikotinoidajn pesticidojn ekstreme danĝerajn por la abeloj.

Tamen la kompromiso kiun devus adopti Bruselo verfakte estas katastrofa plano trudita



de la multnaciaj agrokemiaj kompanioj kiel Bayer, Monsanto kaj Syngenta, kiuj ekde pluraj monatoj ekstreme agresive kampanjas por alveni al tiu rezultato malgraŭ la eksplicitaj rekomendoj de la Eŭropaj sanrilataj aŭtoritatoj. Ilia celo : kontraŭi la volon de la Eŭropaj civitanoj kaj malhelpi la realan malpromeson de la abelmortigaj pesticidoj, kun la celo certigi centojn da milionoj da eŭroj de ĉiujara profito, kiujn per tiuj produktoj enspezas la grandaj firmaoj, kiuj produktas ilin.

Oficiale la tri plej danĝeraj pesticidoj estos malpermesitaj por la daŭro de du jaroj, post kio la sanrilataj aŭtoritatoj kontrolos, ĉu la malpermeso ĉesigis la masakradon de la abeloj, kaj ĉu la Unio devos jes aŭ ne definitive malpermesi la neonikotinoidojn.

Nu, tiu t.n. malpermeso havos nenian efikon sur la sano de la abeloj! Efektive, la tri pesticidoj estos malpermesitaj nur dum kelkaj monatoj ĉiujare, sed grandskale uzataj dum la tuta resto de la jaro sur 85% de la grenoj kaj granda parto de la fruktarboj, legomoj kaj spicherboj, venenos la teron kaj la akvon, kiu poste estos absorbitaj de la t.n. netraktivaj kreskaĵoj.

Grandnombraj studoj montris, ke tiuj ekstreme toksaj substancoj restas en la tero dum tri jaroj post la traktado, kaj ke la netraktivaj kreskaĵoj, semitaj aŭ plantitaj sur la sama tereno montras spurojn de neonikotinoidoj en sia poleno... kiun poste venas rabi la abeloj !

Fine de tiu testperiodo de du jaroj la multnaciaj kompanioj povos pruvi, ke la abeloj estas plu dekmataj malgraŭ la malpermeso de iliaj produktoj kaj ke ili done respondecas pri tio. Tiel ili sukcesos senkulpi siajn pesticidojn kaj gardi siajn profitojn por longa tempo.

Se ni faros nenion, la amasa mortado de la abeloj ne ĉesos malgraŭ la t.n. malpermeso de la neonikotinoidoj, kaj Monsanto, Bayer, Syngenta kaj ĉiuj agrokemiaj laboratorioj povos aserti, ke iliaj produktoj ne kaŭzas la mortadon de la abeloj kaj obteni sian totalan rehonorigon en la merkato.

Tial necesas mortigi en la ovo tiun diablan planon kaj postuli de la Eŭropa Komisiono, ke ĝi tute malpermesu la uzon de tiuj pesticidoj kiuj mortigas la abelojn, kiel cetere ĝi asertas fari tion.

Neniaj kompromisoj, neniam aranĝetoj ! Fari teston post du jaroj por evalui la influon de tiuj pesticidoj sur la polenantoj ne havos valoron !

La agrikulturistoj perdos nenion pro tiu totala malpermeso. Laŭ INRA oni povus rapide malpliigi la uzadon de pesticidoj en Francio per 30 ĝis 40% sen perdo de enspezoj por la kampuloj, revenante al la sistemo de rotacio de la kreskaĵoj, kio ankaŭ permesos efike lukti kontraŭ parasitoj.

Nur en Francio oni vane verŝas ĉiujare pli ol 20.000 tunojn da ekstreme toksaj substancoj sur niajn kampojn ! Fakte la solaj kiuj suferus pro tiu ŝanĝo estus la ĉiferoj de la gigantoj de la agrokemio.

Tiam, mi petas vin : helpi nin krei veran ŝokondan tra la tuta Eŭropo por ke nia premo sur la Eŭropan Komisionon estu pli forta ol tiu de la agrokemiaj premgrupoj, kiuj sen bedaŭro fuŝus vian sanon, vian nutraĵojn kaj la estontecon de la naturo mem por certigi al si tujan grandan profiton. *(Laŭ la interreto)*

Promenado tra la verda Bruselo

(Wandeling door het groene Brussel)

Bruselo, ĉefurbo de la Eŭropa Unio, estas unu el la plej verdaj ĉefurboj en Eŭropo, eĉ se oni konsideras nur la arbaron Zonion. Sed ankaŭ en la urbo mem troviĝas multaj verdaj anguloj.

Pli ol la duono de la Brusela regiono estas verda. La plej granda verda parto konsistas el arbaroj, sed ankaŭ unu el tri Bruselaj domoj havas ĝardeneton. Ĉie en la urbo oni trovas arboviĉojn en parkoj kaj sur placoj : verdajn pulmojn, kiuj permesas al la urbanoj spiri freŝan aeron. Eĉ la Bruselanoj mem ne konscias, kiel verda estas ilia urbo.

Matene la plej mallonga vojo de la Centra Stacidomo ĝis la oficejoj iras tra la Parko Warande. La oficistoj rapidas sur la asfaltitaj poroficistaj vojetoj. La pendoluloj povas lastan fojon spiri ĉi tie freŝan aeron antaŭ ol plonĝi en

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

ŝiajn oficejojn. Dum la tagmeza paŭzo oni vidas tie la samajn oficistojn trotegi tra la parko. Vespere la tempo plimalrapidiĝas kaj regas tie tute alia etoso.

En tiu ĉi momento la parko estas funde renovigata. La verdaĵaj oficistoj de la urbo estas riparantaj la strukturon de la spalirarboj, kaj ĉie staras plantoj en bakoj, pretaj por esti plantitaj. Ni promenas en la direkto de la Wolstraat (Lanstrato), kie la bruo de la driloj alternas kun la kantado de la birdoj, kvankam ne tuj estas klare, de kie ĝi venas.

Inter du belaj burĝodomoj ni subite ekvidas verdan gazonon. Kiam ni trairas la Passage Yourcenas (Jurcenaran Pasejon), kiel nomiĝas tiu koridoreto, ni alvenas en la Parko Egmont, la plej granda parkĝardeno en la surkonstruita kvartalo. Ĝi apartenas al la palaco de Egmont. En la deknaŭa jarcento la grundo ĉirkaŭ la palaco estis parceligita. La altaj burĝodomoj kaŝas tiun ĉi sekretan verdan lokon. Padoj zigzagas kvazaŭ nature inter la arboj, kiuj aperas stari ĉi tie jam kvincent jarojn. En la parko oni trovas ruinojn de la malnova kastelo de la grafo de Egmont. La regiona registaro estas transformanta la oranĝerion en tedomon. La tiea mezepoka konstruaĵeto nomiĝas la Groote Pollepel (Granda Kulerego). Origine temis pri puto en kiu la akvo de la Koperbeek (Rojo Kupra) estis kolektata. Sed tiu ĉi intertempe tute sekiĝis. En 1850 la konstruaĵeto estis translokigita ĉi tien. Ĉirkaŭ la puto estas ĉizite en la gnajso en la Latina lingvo « ke caro Petro la Granda ŝutis sur tiun ĉi lokon sian noblan malsekaĵon ». En 1717 la fama caro vomis tie post drinkado la enhavo de sia stomako. De tie tiu surskribo.

Iom pli for en la Wolstraat la statuoj de la dukoj Egmont kaj Hoorn gardas tre intiman

parketon. Ĉe iliaj piedoj lirlas impona fontano. La bruo de la urbo estas apenaŭ aŭdebla ĉi tie. Arte tonditaj heĝetoj kaj rozuoj kreas romantikan etoson. En niĉoj en la tondita heĝo staras diversaj historiaj personoj, kiuj rezistis al la ĉiopovo de dukoj, reĝoj kaj imperiestroj, sed ankaŭ sciencistoj kiel Merkatoro kaj politikaj rezistintoj. Ĉirkaŭ la parketo staras la statuoj de 48 metiistoj.

Per la Regenta Strato ni promenas en la direkto de la Reĝa Placo. En neatendata verda niĉo troviĝas monumento kun bildo de la Franca poeto Paul Claudel inter nuboj de sambukaj floroj. Iom pli fore troviĝas la statuĝardeno de la Belarta Muzeo. Tuj apud la muzeo la tereno malsupreniras kaj permesas vidon sur la malsupra urbo. La statuoj staras inter verda hedero kaj taksusoj. Estas ideala loko por revii aŭ legi libron aŭ simple ripozi post promeno.

Ke la platanoj estas tre fortaj arboj, estas videble sur la Grenvendoplaco. Dum la rearanĝo de la placo, ili estis laŭlitere senkapigitaj, sed jaron poste ili denove plene estas arboj. Ili estas idealaj aerpurigantoj. Ĉi tie ni estas en la plena Flandra kvartalo de Bruselo, kiu forte etendiĝis dum la lastaj jaroj. La junaj personoj kiuj translokiĝis ĉi tien, ŝatas pasigi la dimanĉojn en la verdaĵo kun siaj infanoj. Tiam la terasoj de la kafejoj estas homplenaj.

Iom pli fore staras la malsanulejo Pacheco (pron. Paĉeko), kiu estas la lasta halto de multaj maljunaj Bruselanoj. Sed ĝia ĝardeno estas tre agrabla kaj trankvila loko, kiu estas cetere alirebla por maljunuloj kaj junuloj. Precipe la pseŭdoakacioj faris la ĝardenon alloga. Ili bele filtris la lumon per siaj folietoj, kio donas al la Begijnhofwijk (Kvartalo de la Beginejo) iomete ludeman etoson.

Sur la Fiŝvendoplaco ni prenas la metroon al la Kruidtuin (Spicherboĝardeno) aŭ Botanika Ĝardeno. Dum someraj vesperoj la Franclingva Kulturkomununo aranĝas ĉi tie subĉielajn film-



spektaklojn kaj koncertojn. Sed ankaŭ dumtage bruas tie la vivo. Bruselaj-Marokaj buboj stariĝis tie sian golejon kaj piedpilkas inter la akacioj. Sur la benketoj babiladas kelkaj sekreta-riinoj dum si tagmeza paŭzo.

Tiu ĉi loko estas fama, ĉar en 1848 oni hazarde malkovris ĉi tie la kulturon de la cikorio. Sed la historio de la Botanika Ĝardeno komenciĝis jam en la dekoka jarcento. Ĉe la alta burĝaro estis modo kolekti en malgrandaj varmejoj maloftajn plantojn el ekzotikaj landoj. Post la Franca revolucio de 1789 iliaj posedaĵoj estis konfiskitaj kaj kunigitaj en la palaco Egmont. Kiam tie mankis loko, oni konstruis la Bontanikan Ĝardenon. Kaj kiam la plantoj laŭletere komencis trabori la tegmenton, ili estis transportitaj al Meise, norde de Bruselo.

Nia promenado finiĝas sur la Vrijheidsplein (Placo de la Libereco), agrabla loko kun kafejoj kaj terasoj. Ĝis 1980 tio estis ordinara kvadrata placo, sur kiun eliris pluraj stratoj. Ĝis iu oficisto de la verdaĵa servo de la urbo havis la brilan ideon aldoni straton al la placo. Tio ŝanĝo havis bonegan efekton. La domoj ĉirkaŭ la placo fariĝis kafejoj kun terasoj, kiuj estas ĉiuj orientitaj al sudo. Ni elektas tableton en la sunlumo kaj plu ĝuas la belan Bruselan veteron. *(Laŭ Jo de Beule)*

Historio de la Romia Imperio (4)

(Geschiedenis van het Romeinse Rijk) (4)

7. Fondo de la Romia imperio (31 a.K.)

Oktaviano estis sufiĉa potenco por refondi la monarĥion, sed memorante la perfortan morton de lia praonklo, Julio Cezaro, kaj la malammon de la Romanoj kontraŭ reĝeco, li lasis ekzisti, kio ankoraŭ restis de la respublika sistemo. En 29 a.K. la senato ofertis al li titolon *imperator*, t.e. ĉefkomandanto de la armeoj. Al tiu titolo li aldonis la titolojn *princeps senatus* (ĉefa membro de la senato), *tribunus plebis* (tribuno de la popolo), *ensor* kaj *pontifex maximus* (ĉefsaĉerdoto). Ekde tiu momento Romo honoris lin per la titolo *Augustus* (eminentulo). La senato kaj aliaj leĝdonaj instuticoj aprobis ĉion kion li volis. Li detenis sin de tro da lukso kaj aroganta agado. Li plu vivis kaj vestis sin simple en lanaj vestaĵoj kaj ĉiam montris sin justa, modera kaj bonkora. Li pardonis al Cinna, kiu organizis konspiron kontraŭ lia vivo.

En tiu tempo la limoj de la imperio estis Atlantiko, Rejno, Danubo, Eŭfrato kaj Saharo. Ĝi estis subdividita en 24 provincojn, kiuj estis administrataj de guberniestroj, kiuj estis parte



Statuo de imperiestro Aŭgusto

nomumitaj de li kaj parte de la senato. La nombro de la loĝantaro certe estis pli cent milionoj, kies duono estis sklavoj. Permanenta armeo de 400.000 viroj, kiuj vivis en kampadejoj tra la tuta imperio kaj laŭlonge de la limoj, havis la taskon protekti la pacon kaj subpremi ribelojn.

Aŭgusto stimulis agrikulturon kaj komercon. Li ŝarĝis sian amikon Agripon per la konstruo de vasta retejo de armevojoj tra la tuta imperio. Li rekonstruis detruitajn urbojn, organizis regulan poŝtservon, plibonigis la situacion de la malriĉa popolo kaj pagis per sia propra mono la impostojn de la provinco Azio. Persone li administris nur Italion. Asistata de privata konsilio, ĉirkaŭita de multaj sekretarioj, li laboris senripoze, protektata de sia pretorana gvardio. Li tiagrade plibeligis Romon per konstruaĵoj, ke li povis diri, ke li ŝanĝis brikan urbon en marmoran. Li interesiĝis ne nur pri la materia prospereco de siaj regatoj, sed ankaŭ provis reenkonduki la malnovajn severajn, pragepatrajn morojn.

En la tuta imperio regis paco. Dum lia regado Romo vivis oran tempon. Danke al lia protekto de la artoj, kaj tiu de lia amiko Meceno, ekstaris tuta serio de grandaj artistoj, poetoj kaj pensuloj. Tiam vivis la historiistoj Salustio, Tito Livio, Tacito, kaj la poetoj Horatio, Ovidio, Tibulo kaj Vergilio. Tiu lasta verkis la faman epopeon *Aeneis*, kiu rakontas en versoj la fuĝon de Eneo (Aeneas) el la brulanta Trojo kaj lian albordiĝon kaj ekloĝiĝon en Italio. Laŭ la Roma tradicio li estis la prapatro de Aŭgusto

tra sia filo Julo. En la 30-a jaro de lia regado naskiĝis Jesuo Kristo, kiu fondis kristanismon.

Dum la lastaj jaroj de sia vivo li estis trafita per malfeliĉoj. Liaj tri nepoj, filoj de lia filino Julia, mortis junaj – malbonaj lingvoj asertis, ke lia dua edzino Livia murdis ilin por liberigi la tronon por siaj propraj filoj –, kaj Julia mem kondukis tiel honte, ke li devis ekzili ŝin.

Lia generalo Varo kun tri legioj estis logita profunde en la Ĝermanajn arbarojn, kie ili (ĉ. 20.000 viroj) estis buĉitaj de la Keruskoj sub gvido de Arminio, romanigita Ĝermano. Frapante la kapon kontraŭ muron, li ofte kriis : Varo, redonu al mi miajn legiojn ! »

Ĉar li ne plu havis viran posteulon, li adoptis Tiberion, la plej aĝan filon de sia dua edzino Livia, kiu sukcedis lin.

Li mortis en 14 p.K., aĝante 73 jarojn. Antaŭ ol morti li demandis al la ĉirkaŭstarantoj : « Ĉu mi bone ludis la komedion ? »

8. La imperiestroj de la du unuaj jarcentoj.

a. La Klaŭdioj.

Tiberio, kiu distingis sin kiel brila armeestro en la daŭraj militoj kontraŭ la Ĝermanoj, estis imperiestro de 14 ĝis 37 p.K. En la komenco li saĝe kaj bone regis la imperion. Lia regado estis modelo de centrala administrado kaj la tuta imperio ĝuis pacon. Per severaj leĝoj pri moroj kaj lukso li luktis kontraŭ la kreskanta malmoraligo. Li ankaŭ bone zorgis pri la provincoj, reguligis la financojn, tiel ke ĉe lia morto li postlasis bone provizitan ŝtatkason. Sed lia laboro ne trovis aprobon, kaj ankaŭ sekve de konspiro li fariĝis melankolia kaj suspektema. Li retiriĝis sur la insulon Kaprio, kiu troviĝas ne tre for de Napolo, lasante la regadon al la kruela Sejano, ĉefo de la pretoranoj, kiu murdigis multajn Romanojn. Post 26 p.K. li ne plu revidis Romon kaj mortis forlasita.

Kaligulo (Caligula, 37-41), pranevo de Tiberio, komencis kiel bona reganto, sed baldaŭ, sekve de grava malsano, li kondukis kiel frenezulo. Sub la influo de la Egipta kulturo li konstruigis en Romo templon por la Egipta diino Isisa. Laŭ la ekzemplo de la Egiptaj faraonoj li havis seksan rilaton kun sia fratino Drusila kaj igis sin adori kiel dion. Post kiam li malplenis la ŝtatkason per siaj ekstravagancaj elspezoj, li kolektis altajn impostojn. Por montri sian malestimon al la senato li nomumis sian ĉevalon senatano. Li estis murdita per membroj de sia propra gvardio.

Klaŭdio (41-54), nevo de Tiberio, jam estis maljuna kiam li estis proklamita imperiestro



Imperiestro Nerono (54-68)

far la pretoranoj. Ĉar li balbutis kaj lamis, li neniam servis en la armeo, sed multe studis. Li tamen konkeris Brition uzante elefantojn, kiuj fortimigis la ĉevalojn de la Belgoj. Li estis bona kaj saĝa reganto. Ĉar li disvastigis civitanajn rajtojn en la provincoj, li estis malamata de la Romaj aristokratoj. Lia edzino Mesalina vivis tiel malmorale, ke li devis mortigi ŝin. Ekde tiam li lasis la regadon al du liberigitaj sklavoj, kiuj estis liaj *ministri* (servistoj). Li reedziĝis al sia kuzino Agripina, kiu havis filon el sia unua edzineco, Lucio, kiun li adoptis kaj nomis Nerono. Sed kiam li volis poste nuligi tiun decidon, Agripina mortigis Klaŭdion.

Nerono (54-68), konata pro sia krueleco, venenigis dum manĝo la malsanecan filon de Klaŭdio, Britanikon, kiel konkuranton por la trono. Laca de la enmiksigemo de sia patrino li murdis ŝin, same kiel sian edzinon, Oktavian, la filinon de Klaŭdio, kaj reedziĝis al la fifama Popea. La filozofon Senekon kaj la poeton Lukanion li devigis suicidi. Nerono ŝatis elpaŝi kiel muzikisto, kantisto kaj aktoro, kaj kredis, ke li estas granda poeto, kiun oni devis akلامي, se oni ne volis morti. Li persekutis la kristanojn, kiujn li krucumis, bruligis vivajn kaj ĵetis antaŭ sovaĝajn bestojn en la cirko, asertante ke ili bruligis Romon. Tiam du generaloj ribeligis kontraŭ li. Li fuĝis, sed estis murdigita

b) La Flavioj.

Nun la legioj kaj pretoranoj disputis pri la rajto nomumi la imperiestron. Du kandidatoj-armeestroj, Galba kaj Otho, estis murditaj. Tria

kandidato, Vitelio, marŝis kun sia armeo al Italio. Sed generalo Vespasiano, kiu tiutempe batalis en Israelo por puni la Judojn pro ilia ribelo, estis proklamita imperiestro far la armeo kaj rekonita kiel tia de la senato.

Vespasiano (69-79), kiu rikoltis gloron per siaj militiroj tra Gaŭlio kaj Judeo, estis vokita al Romo, dum lia filo Tito daŭrigis la lukton kontraŭ la judoj, venkis ilin kaj detruis Jerusalemon (70). Li mem venkis Vitelion en Italio. En la nordo la Bataviroj, kiuj ribelis sub Klaŭdio Civila, al kiuj alligis pluraj Gaŭlaj triboj, estis subjigitaj (70). Vespasiano estis severa kaj saĝa imperiestro. Li plibeligis Romon kaj komencis la konstruon de la fama Koliseo (Coliseum), la plej admirinda produkto de la Roma konstruteĥniko.

Tito (79-81), lia plej aĝa filo, sukcedis lin. Li havis tiel agrablan karakteron, ke la Romanoj nomis lin « la ĝojo de la homa specio ». Dum lia regado erupcio de Vesuvio detruis la urbojn Herkulanon kaj Pompejon. Li finis la Koliseon kaj mortis juna, priplorata de la tuta Romo.

Lia frato, *Domitiano* (81-96) estis sufiĉe bona reganto, sed lia bona flanko estis superata per lia malbona, kaprica karaktero. Kiam li provis regi kiel orienta despoto, uzante teroron kontraŭ la Roma nobelaro, li estis murdita de liaj korteganoj. Tiam la senato elektis la jam maljunan senatanon *Nervon* (Nerva, 96-98) kiel imperiestron. Tiu ĉi adoptis la en Hispanio naskiĝintan generalon *Trajanon*, kiu piede envenis Romon, kondukante sian ĉevalon.

c) *La Antonenoj.*

Kun *Trajan*o (98-117) komenciĝis la t.n. ora periodo de la imperio. Li venkis la Partojn ĉe la rivero Eŭfrato kaj la Daciojn ĉe Danubo kaj aldonis tri novajn provincojn al la imperio. Dum lia regado la imperio ekhavis sian plej grandan vastecon. Li estis bonega reganto, kiu antaŭenigis agrikulturon kaj komercon, kuraĝigis artojn kaj literaturon, malpligis la impostojn kaj redonis al la senato kaj la komicioj parton de ĝiaj antaŭaj rajtoj. Li konstruigis novan Forumon en Romo, kie lia statuo staras sur alta kolono.

Hadriano (117-138), lia familiano kaj sukcedinto, ŝatis vojaĝi kaj konstrui. Li nenigis novan ribelon de la Judoj, kies supervivantojn li deportis. De tiu tempo ili komencis disvastiĝi sur la tuta tero. Li rekonstruis Jerusalemon kaj Atenon, konstruis la Kaledonan Muron, kiu separis Brition de la Kaledonoj aŭ Skotoj, kaj

la amfiteatron de Nimo (Nîmes) kaj la faman ponto trans la rivero Gardo (Sud-Francio).

Antoneno Pio (138-161), kiu donis sian nomon al la dinastio, estis adoptita de Hadriano. Li estis aminda, pia kaj ŝparema viro, kiu ŝatis religion, justecon kaj pacon. En Britio li konstruigis muron norde de la muro de Hadriano

Lin sukcedis lia filo, la filozofo *Marko Aŭrelio* (161-180), kiu estis viro kun altruisma kaj dolĉa karaktero. Dum 13 jaroj li batalis kontraŭ la Germanajn popolojn, kiuj kampadis sur la maldekstra bordo de Danubo kaj la dekstra bordo de Rejno, kaj volis invadi la imperion. Ekde tiu momento la imperiestroj militis nur por defendi la limojn de la imperio.

Jam tre juna *Komodo* (Commodus, 180-192), filo de Marko Aŭrelio, montris kruelan kaj perversan karakteron. Li igis sin kulti kiel duan Herkulon pro sia eksterordinara korpoforto kaj luktis kiel gladiatoro en la areno. Por povi daŭrigi sian malŝpareman vivon li plialtigis la impostojn, murdigis riĉajn civitanojn kaj vendis oficojn. Ĉar li minacis ankaŭ siajn familiaĵojn, ili murdigis lin. La senato malbenis lian memoron kaj forigis sian nomon el ĉiuj dokumentoj kaj de ĉiuj monumentoj.

(El diversaj fontoj – daŭrigota)

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

Ĵaŭdon, la 30-an de majo 2013 :

Nur tri personoj prezentis sin je la oka vespere ĉe Paul Hotterbeekx en Achel por partopreni en la promeno laŭlonge de la planedoj. Promenante tra la belega printempa Achela naturo ni povis studi la planedojn de nia sunsistemo, pentritaj sur grandaj tabuloj kaj provizitaj per ĉiuj datumoj rilataj al ili : grandeco, distanco ĝis la suno, nombro da lunoj. La vetero estis belega. Post la promeno ni iomete ripozis kun glaso da biero en bovinejo transformita en festosalonego.

Ĵaŭdon, la 25-a de junio 2013 :

Nia tre aktiva membro An Olijslagers aranĝis apud sia domo en Veghel (Nederlando) kradrostadon por la Limburgaj esperantistoj por fini nian laboraron. Nur kvar ŝajnis apreci tiun belan geston de An. La aliaj malpravaj, kaj ne nur ĉar ili ne ĝuis tiun bongustegan manĝon.

Ni dankas ĉiujn membrojn de LEA kiuj aktive subtenas nian agadon kaj partoprenis en niaj aktivaĵoj dum la pasinta laborjaro.

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Plua historio de Esperanto (5) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantolando:
- Italio: Itala tribunalo malaprobas angligon (*Ret-Info, Hungario*)
- Francio : Internacia peticio favore al Esperanto (*Thierry Saladin, Francio*)
- Paĝo 5: - Belgio: Domo de Eŭropa Historio kaj Ekzilo (*D-ro Sean Ó Riain, Irlando*)
- Hungario: Civito vendas La Heroldon de Esperanto (*Ret-Info, Hungario*)
Helpu savi la abelojn ! (*Laŭ la interreto*)
- Paĝo 6 : Promenado tra la verda Bruselo (*Jo de Beule*)
- Paĝo 8 : Historio de la Romia Imperio (4) (*El diversaj fontoj*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
-

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.